



**Esperanto
Societo
Frankfurto**

julio 2015

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

ESPERANTO INFORMILO

**Esperanto-
Gesellschaft
Frankfurt am
Main**

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzender:
Martin Schmitt
Gießener Str. 18
35415 Pohlheim
Telefon: abends
0171-7412414
E-Mail:
esperanto@scsy.de

Bankverbindung:
Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt /M.
**IBAN: DE75 5008 0000
0771 5717 01**
BIC: DRESDEFFXXX
Commerzbank
Frankfurt/Main

Beitrag:
mit DEB-Beitrag: 80 €
Familienmitglied: 40 €
Nur ESF: 20 €
Familienmitglied: 10 €

Darmstadt



rozokatedralo

foto: ke

Membroj de nia asocio ĝuis la belan tagon en Darmstadt. Promeno, belaj artaĵoj de novarta stilo ekstere kaj en la muzeo, rozoj en la parko de la rozaltaĵo, bongusta tagmanĝo kaj kafo antaŭ la fino de nia ekskurso.

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d.2.7.2015

ĵaŭdon, la 2an de julio 2015

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten, wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der uns über den DEB-Kongress in Hameln informieren wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj, ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu donos al ni informojn pri la GEA-Kongreso en Hameln.

SPRACHRUNDE

18.30 h

LINGVA RONDO

Unregelmäßigkeiten in Wortschatz und Wortbildung

Misregulaĵoj en la vortostoko kaj kaj vortofarado

Reinhard Pflüger

19.30 h

Germana Esperanto-Kongreso, Hameln

La Germana Esperanto-Kongreso okazis en ĉi tiu jaro en Hameln sub la aŭspicoj de Stephan Weil, ĉefministro de Malsupra Saksio. La urbo, al ni ĉiuj konata laŭ legendo pri la ratkaptisto, estis prezentita jam sur la kongresa signo. Sed, pri kio diskutis la germana esperantistaro, kio estis prezentita, kia estis ekskurso al Bad Pyrmont? Pri ĉio tio ni estos informitaj.

Der Deutsche Esperanto-Kongress fand in diesem Jahr in Hameln unter der Schirmherrschaft des Ministerpräsidenten Die Stadt, uns allen gerstet bekannt, wurde als solches vorgestellt, was wurde man bei dem Ausflug nach Bad Pyrmont gesehen? Über das alles werden wir informiert.



ranto-Kongress fand
meln unter der
Niedersächsischen
Stephan Weil statt.
als die Rettenfän-
de schon im Kon-
dargestellt. Aber,
Esperantisten disku-
vorgeführt, was hat

Margarete und Walter Ullmann

donnerstag, den 16.07.2015

ĵaŭdon, la 16an de julio 2015

18.30 h

babelstunden

babelaj horoj

sommerfest

somera festo

sabaton, la 4an de julio 2015 je 13.30
Rombergstr. 29, 65931 Frankfurt / Zeilsheim, Tel. 069 36402369
cê Elisabeth und Heinrich Rabenstein


Bei schönem Wetter findet das Sommerfest im Garten statt. Bei Regen wird in der Garage gegrillt und in der Wohnung gefeiert. Getränke werden gestellt, zu Grillendes ist mitzubringen. Wer mit dem Auto kommt und einen Gas- oder Elektrogrill mitbringen kann, sollte dies tun. Kuchenbeiträge sollten noch abgesprochen werden.

Für Kinder und Junggebliebene (bis 100 kg) steht im Garten ein Trampolin zur Verfügung. Zu erreichen ist die **Rombergstr. 29** wie folgt:

Von Ffm.-Hauptbahnhof aus mit der S1 oder S2 bis Bahnhof Höchst. - Vor dem Bahnhof (100 m nach rechts) ist die Bushaltestelle. Von hier aus mit den Bussen 53 oder 54 nach Zeilsheim zur Haltestelle **Lenzenbergstr.** (4 bzw. 5 Haltestellen). Von hier aus zu Fuß entlang der Lenzenbergstr. bis zur Rombergstr. (ca. 400 m).

Autofahrer müssen auf den Straßen in der Nähe nach Parkplätzen suchen.

Wir bitten um **Anmeldung** der Teilnahme bis **zum 08. Juli. Tel 06181 76343** K. Eckstädt



geburtstage im juli

naskiĝtagoj en julio

Dr. Robert Bittner 06.07.

Katarina Eckstädt 09.07.

Ni gratulas!

originala literaturo

Karaj legantoj,

finfine plenumiĝis mia deziro: de unu el niaj legantoj mi ricevis anekdoton originale verkita en Esperanto por publikigi ĝin. Mi ĝojas pri tio kaj esperas, ke ankaŭ aliaj niaj legantoj ĝuigos nin per siaj originalaj tekstoj.

Via Katarina

LA TRI KURANTAJ METROJ anekdoto de Fritz-Ferdinand L. Palatinus



Maljuna vireto mirige malgranda sidis sur benko apud la larĝa lago ĵus ekster la vilaĝo. Li rigardis la ondetojn, kiuj krispis la surfacon de la akvo, apogis sian mentonon sur la manoj, kiuj ĉirkaŭtenis la kapon de lia stabila promenbastono, kaj mi supozas, ke li iel meditis pri la paseco de la mondo. Demanda pasero

sukcesis vekti lin el lia milda melankolio. Kaŝema rideto ŝtelis sian lokon en lian vizaĝon.

“Mi bedaŭras, friponeto”, flustris la viro, “ke mi ne kunprenis kelkajn panerojn por vi. Dum mia matenmanĝo mi ne povis imagi, ke vi vizitos min.”

La friponeto saltsaltetis kaj observis la okulojn de la vireto.

“Vi malsatas, ĉu ne? Same mi, la matenmanĝo jam estas tre for. Mi ja ne scias, kial mia edzino persistas, ke mi tiom frue ellitiĝu kaj nutru min.”

Kaj li aldonis: „Kaj poste mankas farendojn por mi. Mi ja estas pensiulo, vi sciu!”

„Ho!“, vokis alia voĉo de post li, kaj tuj la friponeto flugegis for distancon, renkontis arbon, kaj komencis de sekura branĉo observi la evoluon.

“Ne tro priplendu tion. Aŭ ĉu vi kredas, ke vi estas la ununura pensiulo sur la mondo?”

“Ah, bonan matenon, Ĵak! Aŭ pli ĝuste: bonan tagmezon. Jam ne estas mateno plu. Ĉu vi faris vian kutiman medicinan promenon laŭ la lagobordo?”

“Saluton, kara! Mi eksidu apud vi, ĉar mi estas iomete laca, kaj ni povas babilu iomete pri dio kaj la mondo, ĉu ne?”

Tjeri' mangestis la koncernan inviton. "Nur eksidu, nur eksidu, vi estas bona!"

Kun penoj kaj ĝemoj kaj helpe de sia promenbastono, Ĵak, kiu cetere ne estis pli granda ol lia amiko Tjeri', bezonis sian tempon por malgracie trovi ian komfortan sidon.

"Mia juneco definitive estas pasita", li suspiris triste, "mi salajrigas multajn kuracistojn per miaj lezoj kaj damaĝoj, mi konfirmas! Kaj neniu konsolo, mi timas!"

„Nu, mi ankaŭ bezonus iom da konsolo. Dum mi estis dungita metiisto, mi ofte diris al mi, ke mi vere estos feliĉa, se la homoj ne venus al mi pro ĉia eta muŝfurzo definitive prokrastante miajn gravajn laborojn.

Hodiaŭ mi mem ne estas pli ol muŝfurzo, kaj mi ĝojus, se mi povus revidi miajn ekskolegojn de tempo al tempo. Ili invitis nin kelkfoje, sed mia edzino laŭdire suferas je siaj nervoj, ŝi ne eltenas. Tiel mi neniam povis reciproke inviti ilin al festeneto.“



„Nu, mia plejbona, vi almenaŭ havas sanan korpon, sed rigardu al mi? Maltaŭgaj genuoj, maltaŭga spino, maltaŭga intesto. Kiom multe mi sopiras al glaseton de vino preferata, eĉ nur unun je ĉiu tago, pro plibonigi mian vesperan humoron, kiel dum miaj aktivaj tagoj mi faris post la laboro! Sed nuntempe neniel mi povas eviti mian karan edzinogardinon!“

„Ĉu vi vere misfamigas vian karan edzinon?“, pepis voĉo el post la arbetaro, kiu baris la benkon de la vidoj el la apuda vilaĝo.

„Tio sonas, kvazaŭ estas ...“, komencis

Ĵak.

„... Paskal'!“ finigis Tjeri', „Paskal', olda rato, elvenu vian kaŝejon!“

Senlaŭte, kvazaŭ ŝvebanta paŝetis el la verdaĵo vireto, kiu eĉ pli malgranda estis ol la aliaj du kameradoj, kaj kun la plej tenera movo eksidis je la plej ekstera eĝo de la benko.

“Kaj nu, do?”, demandis Ĵak, “kion pri mia edzino?”

“Nu, jes, eble ŝi kverelas kontraŭ via alkoholproblemo, sed ĉu tio estas malbeninda? La mia kontraŭe “

“ALKOHOLPROBLEMO ? – Ĉu via kapo perdis ĉiujn siajn ŝraubojn? Se mi iam tiam ĝuas glaseton de la ruĝa, mi tamen ne havas alkoholproblemon. Famaĉisto, vi!”

„Kion ajn! Sed via kontraŭulo estas nur unu, tio estas tute justa afero! Nun ja rigardu la mian! Ŝi kolektas tutan kompanion ĉirkaŭ sin. El ĉiuj direktoj de la ventoj velas amasoj de gefratoj, geonkloj, genepoj, ĉiaj gefekoj, kaj pluse la tuta mondo! Nekredeble, vere!”

Je ĉiu minuto de ĉiu unuopa tago nia domo pleniĝas de pepoj, gruntoj, vokoj, blekoj kaj knaloj de pordoj meze en la nokto, fonita de neniam ĉesanta kriplo-rado de milionoj da beboj kaj infanoj kun neviŝitaj nazoj. – Kaj en la mezo: la reĝino, la feliĉa kapino kaj korpego de la grandfamilia kortumo, mia edzino! Ĉu tiom nekredeble, ke mi fuĝas je ĉiu ajn ŝanco el la vestiblo de la infero?”

La mieno de Tjeri' tristiĝis videble dum tiu torento, kaj li revis: „Kial nur la mia ne povas esti tiom grandkora, ke ni almenaŭ de temp' al tempo povis akcepti karajn kunhomojn! Ŝi estas tiom ŝparema, ke ŝi kalkulas ĉiun manĝeron, ki-un mi aŭdacas vori. Kompreneble nur pro la plej nobla celo konservi mian fragilan sanecon. Rezisto ne eblas je la minaco de plej patosa torento de indigno ĝis mia fina rezigno! Fragila saneco! Vidu nur!”

Li muskolpoze levis siajn brakojn kaj konsentonĉase alparolis ambaŭ: “Ĉu mi ne estas sana kiel fiŝo en montana akvejo?”

„La sano, la sano!“, koleris Ĵak, „ĉiam la sano. Ĉu vineto unu aŭ alian fojon ne estas sankonserva? Mi diras al vi, ke post nelonge mi deprimiĝos tiel, ke vi ne miru, se vi neniam plu min vidos!”

Nun ili triope sidis sur sia benko, ĉiu en sia aparta maniero, kaj direktis siajn rigardojn al la flirtoj kaj plaŭdoj de la lago, kiuj oraklis nekonatojn. Kelkaj anasoj glitis neimpresitaj siajn forajn rondojn, kaj ie ankoraŭ atendis la friponeto. La tri figuroj de eterna sufero (kiujn la vilaĝanoj sufiĉe ofte mokis „la tri kuran-tajn metrojn“ pro ilia frapa malalteco), elĉerpitaj je vortoj, sensis, kiel la brila suno ilin rapide varmigis kaj humidigis. En sia komuna ŝvita silento la triopo supozis senti, kvazaŭ maldensa, delikata emocio leviĝus el la poroj de la herba grundo ĉie ĉirkaŭe. Odoris je io nekutima, granda, preskaŭ solena.

„Rigardu nur al ni!“, raŭke flustris Tjeri', „kiaj bravaj herooj ni estas! Sidas kaj plendas per ĉiuj fortoj pri niaj malpompaj neniaĵetoj, ĉiu nur pri la siaj, kvazaŭ ni neniam estis juna bando de ribeluloj, kunkatenitaj per bendo pli forta ol ŝtalo!”

„Jes“, anhelis Ĵak, „jes, jes, jes, vi pravas! Ĉu ne iam ni estis tri fratoj de sor-to, sigelitataj per niaj reciprokaj sangoj?”

Paskal' blekis: „Hihihi, post la fojna staploj apud la publika grenejo ni sidis kaj

ilumis tutan horon, ĝis ni sukcesis vundeti nin tiom, ke almenaŭ du tri gutojn de nia nobla sango ni povis interŝangi. La veraj, fidelaj praherooj ni estis, hihhi! Kia dieca bildo tio estis!“

Denove ili sidis senvorte, laŭ mistera maniero subite en pli malpeza humoro. „Sed fakto estas, kameradoj“, iam proklamis Tjeri‘, „ke se ni komune honeste penus, ni povus almenaŭ eltrovi ion, kiel ni komune sukcesos kontraŭstari niajn hejmajn megerojn, kiuj nian tutan vivon diktatoras.“

„Kiel ĉarma. Ĉiuj por unu, kiel la musketiroj!“, pepis Paskal‘ jam elanime amuziĝa.

Ĵak vigliĝis videble: „Ĉu ni do ne povus viziti iun Konstanzon, por ke ŝi ofertu al ni sian plej bonan el la kelo?“

Kaj Tjeri‘ aldonis: „Tiu Konstanzo certe ankaŭ preparas la plej delikatan ponton de bovaĵoj-fazeoloj. Mi ne scias, kiom longe mi ne manĝis tiun pladon, kiu kutimis aparteni al miaj plejaj favoritoj.“

“Kaj mi finfine povas sidi horeton aŭ du ĉe miaj karaj amikoj nur aŭdinte kelkajn ĝentilajn ŝmacetojn dum kelka inteligenta konversacio, ĉe kiuj mi povas forgesi la tumultojn de l’ feroca hordo en mia hejmo.”

Ili reciprokis rigardojn, plenaj de gravegaj signifecoj.

Ĵak unua rompis la kumulitiĝan silenton per la ununura ebla vorto “Ĵisel’!”

Tiun ĉi momenton nia pluma friponeto elektis por salti en la aeron, pafi al nia triopo kaj celi dumflugan bekobaton sur la kalvan kranion de Tjeri‘.

“Ej, diablo vi“, vokis Tjeri‘ kaj per energia mano forpelis la paseron. “Mi ne estas vermo! Serĉu vian nutron aliloke!“

“Ĵisel’!”, eĥis Paskal‘ kun granda malstreĉigo kaj ridis.

„Kiom bonege! Ek al la albergo!“

„Kial ni neniam renkontiĝis tie dum la lastaj jaroj, mi neniam komprenos!“, blovis Ĵak‘. „Eble ni tro misadoris niajn karajn edziniojn kaj forgesis malobei!“ „Do, ek al la “Albergo Ĉe Ĵisel’ ”! Musketiri ni povos tutbone ankoraŭ poste!“, trilis Paskal‘ kaj ili gaje ekstaris, balbutis virajn ŝercojn ĉiuj samtempe, frapis reciproke la ŝultrojn kaj ekmarŝis ĉiu laŭ sia forto al sia longe forgesita rifuĝejo ĵus antaŭ la muroj de la vilaĝo.

Se oni ilin defore observis, kiel ili antaŭĝoje ridis kaj kriis, iam interboksetis kaj iam siajn brakojn surŝultre interplektis, oni sen tro granda mistakso rajtas konkludi, ke niaj “tri kurantaj metroj” jam komencis, nekonscie, sian musketran vojon al maskla emancipiĝo.

Ni nur esperu, ke oni iam povos gratuli ilin je tia fino, ke ne nur ili mem sed ankaŭ iliaj karaj edzinoj povos esti kontentaj.

Je komuna bono!

ausflug

ekskurso




promeno tra la platanobosko:
w. ullmann kaj h. stecay



ankoraŭ kelkaj klarigoj pri la
domoj de artistoj



h. christiansen
el la revuo „jugend“



rusa preĝejo



h. christiansen
skizo por vazo



anina stecay skribas en la
memorkajeron pri nia vizito



promeno tra la rozoparko

fotoj: Martin Schmitt